

El la enhavo:

Štefánik sciis Esperanton
Jarmila Wiatrová
Konferenco de ĈEA
Libromondo
Nova E-universitato
Jaroslav Novobilský
Muzikaj tekstoj
Terminaro de feloj

2
2003

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



**PhDr. Kamila Bártlová kun infanoj de
Esperanto-rondeto en Okříšky
prezentas leterojn el eksterlando**

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 4-foje jare. Abono 9 eŭroj (+ 2 eŭroj aerpoŝte), **rete Starto**:

malovec.starto@clavis.cz,

www.clavis.cz/starto, **rete ĈEA**:

cea.polnický@quick.cz (sekretario)

podhradská@volny.cz (prezidanto)

www.kuk.cz/cea/

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, triobla reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

Membrokotizoj: A 250 Kč, B 150 Kč, D 70 Kč, E 70 Kč, F 5000 Kč, G 130 Kč (Starto), N 25 Kč, eksterlandanoj 12 eŭroj, enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: 600 Kč komencantoj, 700 Kč progresintoj. Aliĝoj: Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratíškovice. melicharkova@quick.cz

Libroservo: Zdeněk Pluhař, Lamačova 658/6. 15200 Praha, tel. 251 817 732, m.pluharova@worldonline.cz

Sekcioj de ĈEA: junulara, katolika, kristana, blindula, medicina, fervojista, ŝakista, SAT-amikara, pri informadiko

Komisionoj de ĈEA: pedagogia, gazetara-informa

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, c/o Pavel Polnický, Lesní 150/VI, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, cea.polnický@quick.cz

IĈO de ĈEA: 00 44 30 34

Banko-konto de ĈEA:

3330-021/0100, Komerční banka, Poděbrady

ISSN 1212-009X

Komitato de ĈEA:

Prezidanto: Věra Podhradská, Poříčí 1, 603 00 Brno, tel. 543 233 047, podhradská@volny.cz (vnější a vnitřní vztahy, čestní členové)

Vicprezidanto (ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio): Lucie Karešová, Havlíčkovo nám. 1, 130 00 Praha 3, tel. 222 780 677 (zápisy, koncepce, metodika)

Vicprezidanto (komitatano A de UEA): Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 257 712 201, fakso 257 712 126 chrdle@kava-pech.cz (mezinár. vztahy, UEA, vydavatelská činnost)

Sekretario: Pavel Polnický, Lesní 150/VI, 290 01 Poděbrady, tel./fax. 325 615 651, cea.polnický@quick.cz (sekretariát, členská základna, účetnictví)

Kasisto: Jindřich Ondráček, Bubenská 17, 170 00 Praha, tel. 220 879 386 (konference, sjezd)

Komitatano: Libuše Dvořáková, Zahradní 2/B, 568 02 Svitavy, 461 532 257, hp@ohs.svitavy.cz (kluby a kroužky)

Komitatano: Jiří Tomeček, Dr. Bureše 3, 370 05 České Budějovice, 602 611 584, jirka.tomecek@post.cz (sekce. komise)

Kontrolgrupo de ĈEA: Prezidanto: Josef Hron, Bohdanečská 68, 530 09 Pardubice, josef.hron@vapkce.cz, tel. 466 401 942;

Věra Šlaharová, Jana Zajíce 2873/22, 400 11 Ústí n. L., slaharova.v@kr-ustecky.cz; Jiří Souček, Mečislavova 223/8, 140 00 Praha 4, soucek@komercpoj.cz

Redaktoro de Starto: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 547 240 690, starto@clavis.cz

Kontrollegis: V. Kočvara, M. Pastrňák, V. Podhradská, P. Polnický

Esperanto-muzeo: Jiří Pištor, Městské muzeum, Staré nám. 78, 560 02 Česká Třebová, muzeum.ct@worldonline.cz

Antaŭ cent jaroj printempe

Milan Rastislav Štefánik

sciis Esperanton

Jan Werner

Antaŭ 49 jaroj (1954) en unu junia kunveno de Esperantista Klubo en Brno, en la hotelo Passage, nun Sloven, samideano d-ro Josef Barvíř rakontis pri okazintaĵo el sia junaĝo, kiu min interesigis tiom, ke mi tuj poste la eventon priskribis en teksto tiam nomita "Samideano rakontas" kaj tuj en la sekvanta kunveno prezentis al d-ro Barvíř petante lin, ke li legu kaj korektu ĝin. Li tuj en la kunveno legis kun krajono enmane, korektis kelkajn detalojn kaj redonis al mi. La skribitaĵon kun la krajone faritaj korektoj mi havas antaŭ mi. Se mi bone memoras, ĝi ne estis publikigita, ĉar la 1950-aj jaroj en Ĉeĥoslovakio ne estis favoraj por Milan Rastislav Štefánik, rekta kunlaboranto de T. G. Masaryk. Jen la jam historia teksto.

Estas la jaro 1903. Praha brilas, Praha bonodoras de floroj, printempo ekregas la naturon, la homoj sentas pli delikate. La homoj junaj pensas pli pasie, junaj koroj batas pli ame, pli forte. La ĉerizarboj ekfloris kaj en foiroj aperis la unuaj kapituloj de salata laktuko. Studentoj kantas pri amo kaj fideleco kaj tamen oni rekonas en ili la tradician strebadon al siaj spirita kaj ekstera liberecoj.

Juna juristo kaj lia ekskolego, oficiro Karel Onyš, kvazaŭ promene postlasas provizoran lignan ponton apud la Nacia Teatro kaj direktas al sia gemuta gast-ejeto en la strato de Jungmann. Ambaŭ enspiras la freŝan aeron, printempan aeron, kiun ankaŭ Praha nun liveras. Jes, nia ĉefurbo estas impresiva, ĝi sorĉe parolas, ĝi koketas kaj tamen restas plu impone majesta, ora kaj plenviva, plenestima. Sed la amikoj silentas pri tio, nur percepte ĉiu el ili agnoskas tion iel preterintence. Neniu povas miri. Koro de la juna juristo dronas en la idealoj kaj kuraĝaj planoj de junaj homoj, kiuj tiam probable estis ankoraŭ pli impresiĝemaj, sed ĉiam progresemaj. Tiaj estis unuavice studentoj. La ideo de internacia lingvo signifas ankaŭ progreson kaj krome ĝi enhavas ideon, kiu altigas nuran internacian interkompreniĝon je la vivo en respektado de homaj rajtoj, je la tutmonda vivo de nova stilo.

La junan juriston antaŭ iu tempo allogis esperantismo. Ĝi profunde enpenetris lin kaj de post unu jaro jam ankaŭ la esperantista klubo en Prago agas kaj subtenas elanon en siaj membroj. Pri la emo de la juna juristo bone scias lia amiko – kaj tiu jen havas okazon memori al li Esperanton, sed kun certa porcio de amikeca ironio, kiel kutime. En krepuska duonlumo de printempa vespero li ĵus ekvidis unu el siaj slovakaj konatoj, studenton de teĥnika altlernejo en Prago, kiel li iras

renkonte kun sia belulino. Tuj li decidiĝis la konaton prezenti al sia amiko Barvíř dirante "Tie vi havas ankaŭ unu frenezulon kiel vi!", ĉar la geduo estis ankaŭ verdstelana. Laŭdire ili ellernis Esperanton por povi interparoli kie ajn tute libere, sen hezito, ke iu komprenas ilin, precipe la patro de lia praga amatino. Krome tio tre konvenis por rozkoloraj amleteroj kaj Esperanto entute servis kontentige el ĉiu vidpunkto. La paro jam alproksimiĝis, la juna slovako ankaŭ jam ekvidis sian konaton.

Gajaj vizaĝoj, interŝanĝo de salutoj, manpremoj, kaj la oficiro Onyř prezentas la junan juriston, samideanon Barvíř. La slovaka studento ĝoje premas manon de la juristo kaj prezentas sin kiel Milan Štefánik. Ambaŭflanke regas granda ĝojo, ke renkontiĝis samideanoj, kiuj antaŭe ne konis sin... La juna juristo Barvíř ne vidis samideanon Štefánik pli, sed en lia memoro restis la bildo de lia figuro, vizaĝo kun bela barbeto, gajaj okuloj kaj energiaj trajtoj. - La jaro 1903 pasis. Forpasis ankaŭ la tempo de studoj. La unua mondmilito. La jaro 1918. Doktoro Barvíř denove aŭdas la nomon Štefánik. Kiu ja ne konus la nomon de generalo Milan Rastislav Štefánik? Memoro pri la samnoma studento jam ege palas. Devas veni impulso por vekti ideon kompari, konvinkiĝi. Post pluraj jaroj doktoro Barvíř ricevis librojn de unu slovaka eldonejo kaj inter ili

troviĝis ankaŭ detala bibliografio de la generalo Štefánik. Foliumane ĝin li hazarde ekvidis portreton de la studento kiun li en tiu ĉi momento tuj ekkonis. La vizaĝo kun bela barbeto, gajaj okuloj kaj energiaj trajtoj. "Jes, mi ja konas lin!"

kapitulo - kaposimila infloresko
gemuta - hejmeca, kun agrabla etoso

Milan Rastislav Štefánik (1880-1919) slovaka astronomo, politikisto kaj generalo. Ekde 1904 astronomo en Francio, ekde 1912 franca civitano, 1914 Kavaliro de la Honora Legio. Dum la milito kiel franca aviadista oficiro helpis ankaŭ fondi ĉeĥoslovakajn legiojn. Kiel kunlaboranto de Masaryk li meritis pri fondo de Ĉeĥoslovakio, fariĝis generalo kaj militministro de la unua registaro, sed mortis ĉe averio de aviadilo. En *Ĉeĥoslovaka Antologio* (1935) aperis rakonto *Štefánik en Afriko*, fakte ĉapitro el biografia romano de L. N. Zvěřina pri la neordinara homo.



Tridek jaroj de la vivo kun Esperanto kaj por Esperanto.



La Esperanto-Klubon (EK) en Havířov trafis dolorplena perdo: Komence de la nuna jaro neatendite kaj subite mortis en la aĝo de nur 49 jaroj samideanino Jarmila Pastrňáková-Wiatrová (Jarka), longjara estraranino kaj oferema kronikistino de EK Havířov.

Jarka konatiĝis kun Esperanto nelonge post fino de studado je ekonomia mezlernejo. Ŝi frekventis kurson por komercantoj kaj poste por progresintoj en EK Havířov. En la jaro 1977 ŝi partoprenis en Lančov kurson por instruistoj kaj faris ekzamenojn kun rezulto: eminenta. Ŝi instruis en kursoj por komercantoj kaj por progresintoj en EK Havířov, tradukadis rakontojn el la ĉeĥa lingvo en Esperanton kaj publikigis ilin en diversaj gazetoj. Ŝi regule korespondadis kun pli ol dudek geesperantistoj el la tuta mondo. Kelkajn el ili ŝi ankaŭ vizitis kaj kelkajn ŝi eĉ gastis en ŝia hejmo (ekzemple inĝenierihon el Japanujo).

Jam ekde la jaro 1972 Jarka fariĝis kronikistino de EK en Havířov. Dum 30 jaroj ŝi zorgoplene enskribadis en la kronikon ĉiujn aranĝojn de EK, raportojn

pri ĝia agado – en la ĉeĥa lingvo kaj en Esperanto. La skribitajn tekstojn ŝi kompletigis per fotografajoj kaj belaj bildetoj. Entute ŝi plenskribis pli ol mil paĝojn en 6 volumoj de granda formato!

Jarka estis ankaŭ entuziasma vojaĝantino. Entute ŝi realigis proksimume 30 vojaĝojn eksterlandajn. Ŝi vizitis sinsekve preŝkaŭ ĉiujn eŭropajn landojn kaj krome ankaŭ Japanujon, Hindion, Egiption, Marokon, Meksikion kaj Kubon. Ĉie ŝi multe fotografis kaj zorgeme notadis ĉiujn travivaĵojn. Pri siaj vojaĝoj ŝi faris entute proksimume 45 diversajn prelegojn kun projekciado de koloraj diapozitivaj. (En ŝia heredaĵo troviĝas pli ol 7 miloj da lumbildoj!) Ŝi prelegis ne nur al esperantistoj en Havířov, sed ankaŭ en Ostrava kaj Frýdek-Místek – kaj eĉ en kluboj de pensiuloj.

Nia kronikistino ofte partoprenis Esperantajn aranĝojn ankaŭ ekster Havířov, kaj eĉ en najbaraj landoj. Ŝi ĉeestis al kvar Universalaj Kongresoj de Esperanto – en Varna, Budapeŝto, Varsovio kaj Prago. Sed ĉefe ŝi aktive kaj regule kontribudis al agado de EK Havířov – kaj kultura kaj socia (ekz. tendarfajroj kaj solenaĵoj). Speciale meritplena estis ŝia helpado en 1989 dum “Festotagoj okaze de la 20-a datreveno de ĈEA” en Havířov kaj en 1996 dum la 8-a Kongreso de ĈEA kaj Festotagoj okaze de la 40-jariĝo de EK Havířov.

Sed nia kronikistino havas ankaŭ plian meriton: Ŝia patro Miloslav Pastrňák, mezlerneja profesoro, dum studentaj jaroj kiel melmernanto tra-

studis la E-lernolibron de Kilian, sed li fariĝis membro de neniuj EK kaj partoprenadis neniujn aranĝojn de esperantistoj. Nur la entuziasmo de filino Jarka por Esperanto forte instigis lin kaj post la jaro 1973 li fariĝis ano de EK Havířov, gvidanto de E-kursoj, organizanto de Esperantaj kulturaj programoj en Havířov kaj aliaj urboj kaj en lastaj jaroj li fariĝis lingva korektanto de revuoj Starto kaj Dio Benu kaj ankaŭ de diversaj Esperantaj tekstoj preparataj por publikigo. Por tiu agado pasintjare ĈEA atribuis al samideano Pastrňák la titolon "honora membro".

Honoro estu ankaŭ al lia filino Jarka!

Estraranoj de EK Havířov



Marta Křenková (eble ŝia lasta foto) kun Ĉestmír Vidman en Strž la 25-an de aprilo 2003

Inaŭguro

Je la 25-a de aprilo, 2003
Memorejo de Karel Ĉapek
Strž apud Dobříš

Post la solena inaŭguro de 1' fremdlingvaj tradukoj de la Karel Ĉapek-verkaro sidas nia esperantista kvaropo en la antaŭdoma parto de la ĝardeno ĉe blankeca tableto kun unu malokupita seĝo.

Alproksimiĝas viro kaj petante permeson alsiĝi, aŭskultas nian rakonton pri Svedujo kaj pri la nordaj alpin-floroj. Ambaŭ temoj evidente kaptis lian atenton. Li elpoŝigas restpeceton de krajono kaj akompanas nian parolon per trafaj desegnaĵetoj. Ankaŭ li enviciĝas en nian babiladon per spritaj rimarkoj.

Poste li malfacile leviĝas, sin pardonpetante, ke li volas rigardi en la ekspozicio, kiuj el liaj verkoj estas tradukitaj en Esperanton.

Neniu alia el la solenaj partoprenantoj la viron ekrimarkis...

Ni volis preni liajn desegnaĵojn por la rememoro; subite ekblovis la vento kaj per rondforma movo fordonis la paperetojn ĉiudirekten...

*Ĉestmír Vidman, Marta Křenková,
Margit Turková, Vlasta Guthová*

(Ekspoziciitaj estis: La blanka malsano, Milito kontraŭ Salamandroj, Poŝrakontoj)

Konferenco de ĈEA

La ĉijara asocia konferenco efektiviĝos en la tagoj **17.-19.10. 2003** en **Litomyšl**, fama historia urbo, kie naskiĝis **Bedřich Smetana** kaj instruis **Alois Jirásek** (tie okazas lia *Filozofia historio*). La loka kastelo estas memorindaĵo de Unesko.

Piaristan preĝejon kun gimnazio kaj klostra internulejo priskribis en siaj romanoj *Litomišla tombejo* kaj *Ordeno de la verkistoj* nia esperantista verkisto **Karolo Pič** (1920-1995), sur kies tomboŝtono tekstas orlittere “esperantský spisovatel”.

Sed Litomyšl estas urbo ankaŭ de alia verkisto-esperantisto, **Stanislav Bubeniček** (1904-1979), kiu post perdo de sia advokateco en 1948 ŝanĝis 16 profesiojn kaj restis kiel trumpetisto en cirko. Post pensiiĝo en 1964 li revenis al Litomyšl, verkis romanon pri sia cirka vivo *Kvapík pro lipicány* (Galopa muziko por lipicanaj ĉevaloj, 1965) kaj konatiĝis kun K. Pič. Ellerninte Esperanton li tradukis sian romanon en Esperanton (*Sub cirkotuko*), kiun en 1988 eldonis en Hago lia plum-amikino Jenny Heetkamp sub iom modifita titolo *Sub cirkotendo* kaj sub literatura pseŭdoŝnomo **Stan Bubenič**.

En la urbo troviĝas interesa muzeo, la t.n. *Portmoneum*, kie oni povas vidi surmurajn pentraĵojn de originala artisto (pentristo kaj verkisto) **Josef Váchal** (*Sanga romano*). La domo apartenis al Jan Portman, kiu antaŭ jarcento invitis la artiston kaj tiu pentris sur la murojn scenojn el infero. La domo fine de la jarcento kadukiĝis kaj la verko preskaŭ perdiĝis, sed en la 90-aj jaroj ĝin savis la eldonejo Paseka.

Antaŭ du jaroj OSIEK-konferenco en Strážnice estis dediĉita al la verkaro de Karel Pič, tial la partoprenantoj poste veturis al Litomyšl. Tie magistrino Milada Kadidlová el la magistrato montris al ili la kastelon, la bierfarejon, kie naskiĝis B. Smetana, la Portmoneum, la tombejon kun la tombo de Pič, la belan historian placon, la piaristajn preĝejon, gimnazion (nun naturmuzeo) kaj klostron, kastelan ĝardenon.

Trarigardo de ĉi tiu bela urbo kaj de ĝiaj vidindaĵoj estos parto de la konferenca programo.



La urban signon (lilion) alportis francaj premonstranoj jam en la 12-a jarcento.

Esperanto antaŭ la publiko (Libromondo 2003)

Ĵaŭde la 24-an de aprilo estis inaŭgurita ekspozicio Libromondo 2003 en foireja palaco de Prago, kvartalo Holešovice. La palaco estis plena de libroj laŭ unuopaj eldonejoj, kiuj prezentis siajn produktojn. Speciala atento estis dediĉita al la afrika literaturo (disdonata anglalingva broŝureto pri 100 plej sukcesaj afrikaj libroj).

Proksime de la afrika ekspozicio en unu vitrino troviĝis ankaŭ libroj en Esperanto, dank' al la poetino Věra Ludíková. Ŝi prizorgis ankaŭ du unuhorajn programojn en salonego por kvindeko da personoj. Ekde la 15-a horo programo pri Esperanto, ekde la 16-a horo pri ŝia nova libro.

La programon pri Esperanto gvidis Jiří Patera, sur la podio sidis Miroslav Smyčka kaj Josef Vích, kun kiuj kelkajn popolajn kantojn kantis ankaŭ juna kantistino. Jiří Patera prezentis la asocian prezidantaron V. Podhradská kaj vicprezidanton P. Chrdle, poste oni deklamis el la poezio de niaj poetoj (Ludíková, Bergrová, Urbanová, Vidman, Karen, Rumler), unue Esperante kaj poste la samon ankaŭ ĉeĥe. Bedaŭrinde oni forgesis, ke la

programo estas destinita por neesperantistoj, estis tie tro multe da legado en Esperanto, tial multaj vizitantoj forkuris. Manko estis, ke oni ne prezentis junajn komitatanojn (Karešová, Tomeček) por montri, ke esperantistoj ne estas nur pensiuloj. La plej "junaj" reprezentantoj tial estis 55-jara P. Chrdle (pri eldonado) kaj 50-jara M. Malovec (pri Esperanto en interreto).

Multe pli da interesatoj venis al la aŭtora horo de V. Ludíková, kiu prezentis sian novan libron "Pošli to dál" (Sendu ĝin pluen). En la libro troviĝas plurlingvaj tradukoj de la ĉefa teksto, ankaŭ la Esperanta (de J. Mráz), kaj reagoj de eminentaj personoj. J. Vích voĉlegis la Esperantan version kaj reagon de J. Patera. Poste estis legataj tradukoj al aliaj lingvoj (ekz. oroma, japana, rusa).

Eble plej populara gratulanto al la poetino estis Josef Fousek el Kladno, konata el televido, kiu post bonhumora enkonduko tralegis sian reagan poemon kaj rapidis for, ĉar aliloke atendis lin alia publiko.

La programon vizitis ankaŭ la poetinoj E. Urbanová kaj Z. Bergrová kun sia edzo, poeto Ĉestmír Vidman kaj s-ino Z. Podmelová (vidvino de J. Karen).

LIRO-2003

"La Ondo de Esperanto" denove invitas al tradicia literatura konkurso Liro-2003 en kvin branĉoj.

1. **Originala prozo** (ne pli ol 30 mil literojn longa).
2. **Originala poezio** (la amplekso ne estas limigita).
3. **Traduka poezio el la rusa lingvo:** poemoj de Fjodor Tjutĉev.
4. **Traduka prozo el la rusa lingvo:** "Ĉelovek v futljare" de Anton Ĉeĥov
5. **Traduka prozo el la angla lingvo:** "The Celebrated Jumping Frog of Calaveras County" de Mark Twain.

En ĉiu el la branĉoj 1, 2, 3 oni rajtas partopreni per ne pli ol tri verkoj.

Sendu tri tajpitajn, komputile kompostitajn aŭ tre klare skribitajn ekzemplerojn de la konkursaĵo al la sekretario de Liro-2003 (RU-236039 Kaliningrad, p. k. 1248, Ruslando). La konkursaĵoj devos atingi la organizantojn antaŭ novembro 2003.

Subskribu vian konkursaĵon per pseŭdonimo kaj aldonu slipon kun indiko de la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso. Oni ne rajtas sendi verkojn, kiuj jam estis publikigitaj aŭ premiitaj en aliaj konkursoj.

La originalaj tradukotaj tekstoj estas ĉe <http://Esperanto.Org/Ondo>, aŭ petu ilin ĉe la sekretario kontraŭ internacia respondkupono.

La laŭreatoj de Liro-2003 ricevos diplomojn kaj libropremiojn. La rezulto estos anoncita je la Zamenhofa Tago 2003. La organizantoj rezervas al si la rajton ĝis la 31-a de decembro 2005 publikigi la ricevitajn konkursaĵojn en "La Ondo de Esperanto", libroforme kaj elektronike.

Fabelkonkurso por infanoj

La finna Paatalo-Instituto (hejmpaĝo www.taivalkoski.fi/paatalo-instituutti) organizas fabelkonkurson en Esperanto por infanoj ĝis 13-jaraj (unuopuloj aŭ grupoj). La longeco de la verkoj ne estas fiksita. La konkursaĵoj alvenu ĝis la 15-a de septembro 2003 ĉe: Paatalo-Instituto, Fabelkonkurso, PL 39, FI-93401 Taivalkoski, Finnlando. Oni uzu pseŭdonimon kaj menciu, ĉu temas pri unuopulo aŭ grupo. La vera nomo, adreso, naskiĝdato kaj (se eble) telefonnumero aŭ retadreso estu en alia koverto.

Osmo Buller

Rete: osmo.buller@kolumbus.fi

Biblio en interreto

Ĉe la reta adreso www.diebibel.de troveblas la Sankta Biblio en 50 lingvoj kaj 107 versioj, INKLUZIVE DE ESPERANTO. Estas tie ankaŭ 3 ĉeĥaj tradukoj (ekumena, el Kralice kaj Nova vojo).

Nova E-universitato

En Slovakujo, Komárno, ekde la venonta studadjaro (en oktobro) komenciĝos universitata preparo en novkreata Libera Eŭropa Universitato, filino de Internacia Akademio de la Sciencoj (AIS), San Marino. Fondo-grupo komencas okupiĝi pri konstruado de la universitatejo (nome bakalaŭra, magistra kaj doktora studado, en tri direktoj: turismiko, manaĝerado, interlingvistiko). La studado estas planita kiel "ekstera" elektronika studado (pere de interreto). En komunikado estu uzataj kiel oficialaj lingvoj Esperanto kaj la germana lingvo.

Pri la vortoj KOREO kaj EGIPTO

En 1988 la Akademio de Esperanto deklaris:

La formo *Koreujo* estas kontraŭfundamenta. La sola formo, kiu obeas la Fundamenton, estas **Koreo** kaj ties anoj estas **Koreanoj**. La sola formo, kiu obeas la Fundamenton, estas la landnomo **Egipto**; ties anoj estas **Egiptanoj**.

La Akademio tiam referencis al la 15-a regulo de la Fundamenta Gramatiko "preferi la plej internacian landnomon".

Reveninte al tiuj demandoj la Akademio nun konstatas, ke la 15-a regulo per si mem ne determinas, kiu ano de internacia vortofamilio fariĝu baza en Esperanto, kaj kiun el la internaciaj signifoj ĝi havu. Tial uzado de la vortoj KOREO kaj EGIPTO kun genta aŭ landana signifo ne malobeas la 15-an

regulon, same kiel tia uzado de ekzemple la vortoj ĈINO, JAPANO kaj PORTUGALO tiun regulon ne malobeas, malgraŭ la fakto, ke por ĉiu el ili la internacie plej ofta signifo estas landa.

Skve la Akademio de Esperanto nun deklaras, ke neniu el la landnomoj **Koreo**, **Koreujo**, **Koreio**; **Egipto**, **Egiptujo**, **Egiptio** malobeas al la reguloj de la Fundamento de Esperanto. Per tio la Akademio nuligas siajn antaŭajn decidojn el 1988.

La nova decido estis aprobata en marto 2003 per 30 jesaj voĉoj kun 2 neoj kaj 1 sindeteno (la nombro de la Akademianoj estis tiam 44).

EN LA PARLAMENTEJO DE EU - PRI KOMUNIKAJ RAJTOJ

Simpozio "Kian lingvopolitikon al multlingva Eŭropo?" pasis en la Eŭropa Parlamentejo, Bruselo, la 6-an de majo, iniciatita kaj preparita de la eŭrop-uniaj E-aktivuloj, kun forta subteno de UEA. La simpozion partoprenis neregistaraj organizoj, interesitaj pri la justa solvo de la lingvaj problemoj. La simpozio pri-diskutis kaj akceptis principojn pri la komunikadaj rajtoj kaj devoj de la eŭropaj civitanoj, rekomendataj por konsidero en la verkata Eŭropa Konstitucio. En la plena raporto aperas rekomendo atenti ankaŭ Esperanton, kiel eblan pedagogian instrumenton por plifaciligado de la studado de fremdaj lingvoj. Plenan anglan aŭ francan tekston legu ĉe www.europe-citizen.net.

OFICISTAJ ŜANĜOJ EN LA CO

- Ekde la 1-a de majo en la CO ne plu laboras Nikola Raŝiĉ, kiu dum dek kvin jaroj zorgis pri la organizado de la Universalaj Kongresoj.

- La Aganta Kongresa Sekretario estas nomumita Clay Magalhaes, antaŭe duontempe helpinta al Nikola Raŝiĉ pri la Kongresa Fakoj kaj duontempe laborinta en la librotena fakoj.

- Komence de majo en la librotena fakoj plentempe eklaboros Stanka Starĉeviĉ, Nederlando. Ŝi anstataŭigos tie Clay Magalhaes kaj ankaŭ helpos plifortigi la librotenan fakon de UEA.

NOVA AGANTA KONSTANTA KONGRESA SEKRETARIO

Clay Magalhaes naskiĝis la 2-an de aŭgusto 1974 en Foz do Iguacu, ŝtato Paranao, suda Brazilo. En 1995 li diplomigis pri turisma manaĝerado en la Ŝtata Universitato de Okcidenta Paranao ("Unioeste"). Plie li partoprenis en diversaj kursoj kaj seminarioj pri manaĝerado de turismaj entreprenoj, i.a. kurson de Internacia Konferenco kaj Kongresa Asocio (ICCA) por junaj profesiuloj en Svislando en 2000.

En Brazilo li havis laborajn spertojn i.a. en vojaĝagentejoj kaj en kongresoj interpretante inter la portugala, hispana kaj angla. Clay Magalhaes esperantistis en decembro 1992. Li vivas en Nederlando ekde majo 1996, kiam li eklaboris kiel volontulo en la Kongresa fakoj de la Centra Oficejo de UEA, helpante por la Praga UK.

Li volontulis ankaŭ en la sekvaj du jaroj asistante en la preparoj de la Ade-

lajda kaj Montpeliera UK-oj. Ankoraŭ pli profunde li povis sekvi la laboron de KKS ekde 1999, kiam li estis dungita kiel oficisto en la kongresa fakoj. Lastatempe li helpis ankaŭ en la librotena fakoj de UEA.

Clay ŝatas aviadon kaj modernan muzikon. Somere li biciklas kaj rulketas, por kio estas bonegaj kondiĉoj en Nederlando. Krom Esperanto, portugala, hispana kaj angla lingvoj li ankaŭ flue parolas la nederlandan.

GOTENBURGO: VIRTUALA UK KAJ ALTA PROTEKTANTO

Esperantistoj, kiuj ne venos al Gotenburgo, povos sekvi ĝin en speciale lanĉita nova retejo www.uk-2003.net "Virtuala kongresejo de la 88-a UK".

Tie eblos konatiĝi kun Gotenburgo, la Kongresejo, legi Kongresan Kurieron, fragmentojn de iuj prelegoj, vidi fotojn.

La vizitantoj de la retejo povos sendi mesaĝojn al la kongresanoj, uzante la kongresan numeron kiel la adreson - tiu letero estos liverita surpapere pere de la kongresa Mesaĝtabulo.

Funkcios ankaŭ propra diskutejo pri la "Kongresa temo", en kiu la retaj partoprenantoj de la Virtuala UK povos kundiskuti pri lingvaj rajtoj kaj respondecoj.

Alia UK-novajo:

La sveda ĉefministro **Goran Persson** akceptis esti Honora protektanto de la 88-a Universalaj Kongreso de Esperanto en Gotenburgo.

Laŭ informoj de Franko Luin

TEJO - AKTUALE

1. BRITA/SKOTA KONGRESO

De la 23-a ĝis la 26-a de majo okazas la landa kongreso en Glasgovo (Skotlando). La kongresa kotizo estas 15 GBP (21 EUR). Junularo Esperantista Brita (JEB) okazigos propran programon; gejunuloj sub la aĝo 26 povas peti subtenon por la vojaĝo kaj la kotizo ĉe la fondaĵo NoJEF.

2. LERNU.NET

Pli kaj pli da homoj vizitas lernu! <http://www.lernu.net> (retan kurson de Esperanto por gejunuloj en multaj lingvoj).

3. TEJO.ORG EN 24 LINGVOJ

TEJO-paĝaro nun legeblas en la hebrea, rumana, ĉeĥa, slovaka, eĉ en la klingona (kosma lingvo de Startrek - sed ankoraŭ ne en la itala).

4. "ĜISDATE PRI ESPERANTO" EN 25 LINGVOJ

La dokumento "Ĝisdate pri Esperanto" nun legeblas ĉe www.lingvo.org/xx/3/250 kaj www.uea.org/informado/ghisdate en 25 lingvoj: angla, bulgara, ĉeĥa, dana, Esperanto, estona, franca, itala, germana, greka, hispana, hungara, kataluna, korea, litova, nederlanda, norvega (bokmal), pola, portugala, rumana, rusa, serba, slovaka, suoma kaj sveda.

5. NOVA RETREUVUO - LIBERA FOLIO

Aperis la sendependa reta movada bulteno "Libera Folio". Ene troviĝas artikoloj de Renato Corsetti, Mark Fettes, Ilja De Coster, Nikola Rašić, kaj aliaj gravaj esperantistoj. La revuo estas redaktata de István Ertl (pli frue redaktoro de "Esperanto") kaj Kalle Kniivilaa (pli frue estrarano de UEA pri informado). Rigardu ĉe

<http://folio.xrs.net>.

6. RETLISTO "JUNULARO DE UEA"

La subkomitato Junularo de UEA havas ankaŭ retliston, en kiu povas membri UEA-komitatoj interesiĝantaj pri la temo Junularo, sed ankaŭ eksteraj spertuloj (kiel ekzemple TEJO-komitatoj). Por aŭdigi vian voĉon en la nuntempaj gravaj diskutoj, aliĝu al tiu listo vizitante

<http://groups.yahoo.com/group/sk-8-junularo-de-uea>

aŭ sendante malplenan mesaĝon al sk-8-junularo-de-uea-subscribe@yahoo.com.

Informilo por interlingvistoj

estas revueto pri lingvopolitiko, internacia komunikado, lingvoplanado, esperantologio kaj ankaŭ aliaj lingvo-projektoj. Aperas kvarfoje jare. Interesatoj skribu al eldonanto: CED ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Odborná knihovna Českého esperantského svazu

Korespondenční adresa:

Odborná knihovna
Českého esperantského svazu
C/o: Zdeněk Pluhař
Lamačova 658/6
152 00 Praha 5 - Hlubočepy
Tel.: 251 817 732

E-mail: m.pluharova@tiscali.cz

Půjčovní řád jsme zveřejnili ve Startu 4/2002. Zde jen stručně uvádíme, že knihy se půjčují členům ČES na území České republiky, pouze poštou a na dobu 30 dnů. Mimořádně cenné výtisky se nepůjčují, ale lze z nich pořídit kopie. Čtenářské zápisné je 100 Kč, poštovné za konkrétní zásilku podle sazebníku České pošty, kopie podle skutečných nákladů.

BELETRO

- B 045:** Krusten Erni: Okupacio
B 070: Tammsaare, A. H.: La mastro de Korboja
B 071: Drezen, Hilda: Estona soveta poezio
B 149: Altenberg, Peter: Skizoj
B 200: Schulhof S.: Aŭtunaj floroj
B 219: Homero: Iliado
B 297: Kivi A.: Sep fratoj
B 298: Aŝma
B 304: Neruda J.: Vampiro ed altra rakonti
B 338: Breinholst, Willy - Ni en Skandinavio
B 344: Delaire Pierre - La dolĉa Franclando
B 345: Kníchal Oldřich - Mediteme
B 346: Szilágyi, Ferenc: Koko krias jam
B 347: Wagnalls, Mabel: Palaco de danĝero
B 355: Arbes J: Rakontoj
B 384: Heer, J.C.: Ĉe la sanktaj akvoj
B 385: Ĉeĥoslovaka antologio
B 386: Hungara antologio
B 391: Gardonyi: Sklavoj de Dio
B 393: Sekelj, Tibor: Kumenaŭa la Filo de la Ĝangalo
B 394: Valano, Johano: Ĉu li bremsis sufiĉe?
B 395: Orzeskova, Eliza: Bona sinjorino
B 396: Nemere, Istvan: La fermita urbo

- B 397:** Nemere, Istvan: La blinda birdo
B 398: Rimanto, Nenjo: Versoj por infanoj
B 399: Vrba, Jan: Homo de Dio
B 400: Čapek K.: Libro de apokrifoj
B 401: Kvarfolio - versoj de pragaj E-poetoj
B 418: Wagnalls, Mabel: Palaco de danĝero (pri Madame la Pompadour)
B 419: Linannkoski: Batalo pri la domo Heikkilä
B 420: Kavalov, Jantaj: La ropoda falko
B 421: Hund-bazaro (HEA)
B 422: Krilov: 111 fabeloj
B 423: Fekete, Istvan: Vuk (hungaraj fabeloj)
B 424: Swift, Jonathan: Liliputo - unua vojaĝo de Gulivero
B 425: Musset, A. de: La du amatinoj - la kapricoj de Mariano
B 428: Gabrielli, Lina: La kombilo
B 429: Korte, P.: Savo el la neĝo
B 431: Mikami Teruo: Japanaj fabeloj
B 433: Molnár F.: La knaboj de Paŭlo-strato
B 434: Rimanto, Nenjo: Ludiloj dua ABC Libro
B 435: Jerrold D.: La litadmonoj de sinjorino Kodel
B 436: Akita Ujaku: La regno de cignoj
B 437 (459): Aŭtoro nekonata - La friponeto de Tormes
B 438 (468): Dobrzynski, Roman: La nigra kokino Miki
B 439: Karinthy F.: Norda Vento
B 452: Ergoto de Bonaero: Kalejdoscopa Varieto
B 457 (499): Jacintho Roque: Malbona lupo reenkarigiĝinta
B 461 (493): Tadasi Matui - Momotaroo (Persikulo)
B 462 (487): Gin Gin - Karpetoj transsaltis la drakpordon
B 463: Gingŝan Lu - Bela konvolvulo
B 464: Jinjun - Malsaĝa avo
B 465: Kjunti - Rakontoj pri Liu Hulan
B 466: kolektivo (bildoj): Antaŭ kaj post ŝtormo
B 467: Geng Geng - Bela revulo
B 468 (490): Yang Yi - Ĉion faru mem ni ĉiuj
B 469 (489): Yanrong He (bildoj) - Sportistetoj
I-B 371: Vendita Fianĉino

Knihovna

I-B 372: Najado
I-B 482: Asteriks la Gaŭlo
I-B 483: Hoffmann H.: La Strubelpetro
I-B 493: Balázs B.: La sep reĝidoj
B 497 (449): Güangu Ŝju (adaptis) - Mi volis viziti lernejon
B 498: Ĝihi Gi: La bela Ĝuang-brokato
B 440: Idetoj
B 441: Vortludoj
B 442: Sub la ĉielo
B 443: Du teatraĵoj por junaj esperantistoj
B 444: Kantoj kaj rakontoj
B 445: Kion vi faros?
B 446: La longa maristo
B 448: Vilaĝano el Poltava
B 449: Latina Poezio
B 451: Dharmatilake, C. H.: Rakontoj el Panĉantoro
B 470: El japana lando kaj popolo
B 471: Fisker, Robert: Morso-klubo
B 472: Latva fabela reto
B 473: Benedek, Elek: Hungaraj fabeloj
B 474: Christophersen, Rigmor: Else kaj Bo
B 475 (472): Yonggen Ĉen (kompilis) - Ĉevalido transiras riveron
B 476: - Pli kaj pli rapide
B 477 (467): - Orharulo kaj Ruĝakresto
B 478 (466): - Kaj nun ni eklaboru
B 479: Kampomuso ekskursas
B 480: Fuhing Ĝaŭ: Ĉasado kun avĉjo
B 481: Keiko: Kiu ne estas en lito
I-B 484: Winkler, Věnceslav: La ŝtelita lampo
I-B 485: Hukuinkan-Ŝoten: Gastoj de Glito kaj Glato
I-B 486: Peroci, Ela: Pantoflokatinio
I-B 487: Peroci, Ela: Mia Ombrello povas esti Balono
I-B 488: Klopodo de simioj por ekvidi la lunon (EPĈ)
I-B 489: Knabino kaj Garolo (El Popola Ĉinio)
I-B 494: Hukuinkan-Ŝoten: Glito kaj Glato sin banas mare
I-B 495: Dreves Uitterdijk: Miraklaj Aventuroj de Sinjoro Longokrurulo

VORTAROJ, TERMINAROJ (Signo V)

V 001: Boirac, E.: Plena vortaro A-K. 1909
V 003: Bildordboken (Bildvortaro). 1949
V 004: Technical dictionary of road terms in 6 languages. 1951, 320 p., Da,D,E,S,F,I
V 010: Veŭture, A.: Radio-terminaro. 1960
V 011: Verda, M. kaj V.: Kudra kaj trika terminaro. 1960, 24 p., Eo
V 012: Haferkom, R.: Technische Wörterbuch... (Tehnika vortaro germana - esperanta). 1967
V 020: Broise, A.: Leksikono pri vojo. 1957
V 021: Broise, A.: Inĝeniera terminaro pri ŝosekonstruo. (Lumkopijaĵo), 41 p., Eo,E,F
V 025: Wüster, E.: Maŝinfaka Eo-vortaro prielementa. 1923, 112 p., Eo,D
V 030: Ginz, O.: Radioamatérský slovník pětijazyčný. 1927, 228 p., Cs,Eo,D,F,E
V 044: Malgranda vortaro aŭto-turisma.
V 048: Eyama-Tokiziro: Aŭta terminaro Ea-japana-angla. 1969, 142p.
V 053: Csatkai, D.: Hatnyelvu geodéziai szászótár (Geodezia fakvortaro). 1-a vol., 1976, E,Eo,F,Hu,D,R
I-V 063: Mokerský Josef: Letecký technický slovník (ĉesko-angl.-fr.-nĉm.)
V 067: Siwicki, K.: Internacia elektroteknika vortaro. Grupo 05 - Fundamenta terminaro. 1963, 56 p., Eo,Pl
V 068: Internacia elektroteknika vortaro. Grupo 07 Elektroniko, 08 Elektroakustiko. Varsovio 1965, 174 p., Eo,Pl,E,F,D,I,Sv
V 069: Siwicki, K.: Internacia elektroteknika vortaro. Grupo 10 Maŝinoj kaj transformiloj. 1963, 42 p., Eo,Pl
I-V 092: Hradil, J.: Ea medicina terminaro. 1979
V 095: Fialat, D. k kol.: Aŭtoturisma vortareto. 1977, 45 p., Eo,Hu,Cs,Sk,D,Pl
V 097: Több nyelvű... (Plurlingva sanitara ekonomia vortaro). 1974, 96 p., Hu,Sh,S,Eo
V 098: Demografia vortaro. 1974, 92 p.
V 106: Waringhien, G.: Plena Ilustrita Vortaro de Eo. 1970, 1342 p.
V 135: Telekomunika vortaro deklingva kun aldonitaj E-aj tradukoj. TC-ISAE, 1979, 98 p.

- V 143:** Internacia elektroteknika vortaro. Grupo 07 Elektroniko. Publ. TC-ISAE 77/1. 104 p.
- V 154:** Noyer, G. kaj V.: Ärztlicher Dolmetscher (Kuracista interpretisto), 1980, 316 p.
- I-V 155:** Werner, J.: Esperanta terminaro de terminologia fako, 1982, 14 p., Eo,E,Cs
- V 141b:** norma - Názvosloví kožešnických strojů, zařízení a nářadí
- V 171:** Rybář, J.: Terminaro de hidraŭlaj meĥanismoj. 1982, 52 p., Eo,E,Cs,F,D,R
- V 173:** Obrazový slovník (pasivní součástky pro elektroniku) Tesla
- V 174:** Cabák, F.: Komputika vortaro Esperanta-ĉeĥa, ĉeĥa-Esperanta
- V 179:** Bertin Christian: Angla-Esperanta telekomunika vortaro
- V 191:** Sřěda, L.: ON 79 7103 Názvosloví operací v kožešnické výrobě
- V 194:** Mařík, J.: Armea Terminaro Ĉeĥa-Esperanta
- V 205:** Bakalář, J.M.: Slovníček řeči světové volapük
- V 217:** Novaj vortoj Eesperantaj (1904)
- V 222:** Zamenhof, L.L.: Granda vortaro Germana-Esperanta
- I-V 234/I:** Studaĵo por Konkurso "Kreanta Junularo"
- I-V 234/II:** Fakvortaro de la cifere regataj ilmaŝinoj
- I-V 235:** Technický překladový slovník - počítačová technika
- I-V 236:** Mandler-Gyorgy: La programsistemon por prilabori la plej grandan vortaron de Esperanto faris kaj ĉiujn eblecojn de la komputado servis G.M.
- I-V 237:** Mandler-Gyorgy: La programsistemon por prilabori la plej grandan vortaron de Esperanto faris kaj ĉiujn eblecojn de la komputado servis G.M.
- I-V 238:** Mandler-Gyorgy: La programsistemon por prilabori la plej grandan vortaron de Esperanto faris kaj ĉiujn eblecojn de la komputado servis G.M.
- V 267:** Werner J.: Matematika Vortaro Esperanta-Ĉeĥa-Germana
- I-V 271:** norma - Názvosloví kožešnických kožešin (čeština, slovenština, ruština, angličtina, němčina, francouzština, španělština, Esperanto)
- I-V 272:** Sřěda: Terminaro de feloj kaj peltoj
- I-V 275:** Terminologia Vortaro
- I-V 276:** Reiorsol, O.: Matematikaj kaj statistikaj terminoj en Esperanto
- I-V 279:** Reiorsol, O.: Matematika kaj statistika terminaro Esperanta
- I-V 280:** Kiselmann, C. O.: Matematika Terminaro, Esperanto-Angla-Franca-Sveda
- V 301:** Haferkom - Dellian - Belinfante: Scienca kaj Teknika Terminaro
- V 302:** Franca ilustrita vortaro (1927)
- V 303:** Nova Vortaro Esperanta-Ĉina
- V 307:** Durrant: Aeronautika terminaro
- V 308:** Duden
- I-V 309 (271):** Holub, Josef Dr., Kopečný František Doc. Dr.: Etymologický slovník jazyka českého
- V 310:** Duden
- V 316:** Internacia Kemio-Vortaro
- V 371:** Esperanto en Perspektivo
- V 409:** Plena Vortaro de Esperanto
- V 410:** Kolektivo: Konversacia Vortaro
FAKA LITERATURO (Signo F)
Ĝeneralaj aferoj, UDK 0
- I-F 096:** SAEST 1978. Kolekto de seminariaj referaĵoj. Žilina, 81 p., Eo
- I-F 153:** SAEST 1980. Kolekto ... Ústí n.L.
- I-F 162:** SAEST 1982. Kolekto ... České Budějovice, 93 p., Eo
- I-F 134:** Konsilaro por la farado de la sciencaj kaj tehnikaj vortoj. ISAE, 1911, 80 p., Eo
- F 101:** Eichholz, R.: Ĉu komputero, komputilo, komputoro, komputro aŭ kiu? Cirkulero TC 76/1. 1976, 16 p., Eo
- I-F 144:** Recommendation ISO R 919. Guide pour l'élaboration des vocabulaires systématiques (Gvidilo por ellaborado de sistemaj vortaroj). 1969, 16 p., F
- I-F 145:** Recommendation ISO R 1149. Présentation des vocabulaires systématiques multilingues (Arango de plurlingvaj sistemaj vortaroj). 1969, 24 p., F

Knihovna

I-F 146: DIN 2333. Fachwörterbücher. Stufen der Ausarbeitung (Fakaj vortaroj. Etapoj de prilaboro). 1974, 10 p., D

F 136: ČSN 01 0181. Abecední řazení. 1978, 32 p., Cs

F 137: ČSN 01 0192. Rejstříky publikací. 1978, 12 p. Cs

F 161: Möller, O. - Krause, F.: Systemübersicht der Anpassung der Deutschen Stenografie an die internationale Sprache Esperanto. 1979, 12 p., D

F 156: Hřšel, Z. - Kyjovská, B.: Eo. Soupis literatury z fondů Státní vědecké knihovny v Brně. 1981, 40 p., Cs

I-F 107: Karásková, R.: Esperantská literatura 1900-38 (soupis R 799) a 1946-79 (soupis R 800) ve fondech SVK v Olomouci. 1979, 7+4p., Cs

F 064: Bibliografio de matematikaj kaj natursciencaj terminaroj en Eo. Dokumento E/V/4 de CED. 1972, 4 p., Eo,E

I-F 085: Holmstrom, J.E.: Interlingual Scientific and Technical Dictionaries. 1949, 68 p., E

I-F 192: Akademijaj Studoj 1983

Soci-sciencaj verkoj. UDK 3

F 032: Universala deklaro de homaj rajtoj. 1968, 12 p., Eo

F 026: Tonkin, H.: Financa evoluigo. Manlibro pri la financa programo de la Eo-movado. 1976, 64 p., Eo

Matematiko. Natur-sciencoj. UDK 5

F 005: Andrews, F.E.: Ekskurso en nombroj. 1934, 16 p., Eo

I-F 038: Reiersol, O.: Probablokalkulo. SUK 1976, 84 p., Eo

I-F 037: Reiersol, O.: Konsideroj pri matematikaj kaj stokastikaj terminoj en Eo, 1973, 27 p., Eo

I-F 090: Halvelik, M.: Pri gravito kaj tempo en rilato kun tempovojaĝado kaj la NIFO-fenomeno. 1967, 68 p., Eo

F 062: Oterma, L.: Pri la kometo 1939 IV

P/Väisälä. 1970, 12 p., Eo

I-F 049: Manlibro pri transporto de fluidaĵoj. 1971, 228 p., Eo

F 019: Tüma, M.: Pri la varmo. (Lumkopiaĵo) 1972, 222 p., Eo

F 052: Tüma, M.: Pri la varmo. 1974, 222 p., Eo

F 017: Symboly a názvy fyzikálně chemických veličin a jednotek. 1971, 54 p., Cs

F 018: Symboly veličin a názvosloví používané v analytické chemii. 1972, 56 p., Cs

F 066: Pióro, J.: Kemiaj afiksoj internaciaj. 1966, 40 p., Eo

I-F 040: Pióro, J.: Neorganikaj kaj organikaj kombinaĵoj. 1970, 44 p., Eo

I-F 039: Pióro, J.: Fermentoj. 1970, 16 p., Eo

I-F 086: Gilly, L. - Bisci, R.: Aktiveca mezuro de 14-karbone markita barikarbonato por scintilantaj ĝeloj. Eo

I-F 087: Michaelis de Baenz, J. - Amit, A.: Kristalaj progresoj de la 5 BD glukosido de la \pm narigenino. Eo

I-F 089: Kavka, J.: Pri la klasado kaj nomenklaturado de la fonolitaj rokaĵoj. 14 p., Eo

I-F 151: Flint, M.: Porfirinoj. SUK 1974, 82 p., Eo

I-F 088: Servian, J.L.: Provoj por akiro de I-toksino markita per I-131. 1963, 4 p., Eo

Medicino. Tehniko. UDK 6

F 013: Modernaj tendencoj kaj evoluoj en medicinaj sistemoj por radiodiagnozo, radioterapio, nuklea medicino, medicina elektroniko. Eld. PHILIPS, 40 p., Eo

F 159: Bruin-Kooij, I. de - Wit, A.J.F. de: Energio. 1981, 63p., Eo

I-F 036: Elektra fabriko GANZ (1878-1968). 1968, 6 p., Eo

F 028: Pawlik, R.: La unua atoma elektrejo. 1955, 8p., Eo

I-F 035: Baka, L.: La rolo de temperatura koeficiento de kondensatoro kaj ties mezurproblemo en diversaj oscilatoroj. 8 p., Eo

I-F 059: Ermenkov, K. - Dimitrov, J.: La vagonkonstruado en Popola Respubliko Bulgario. 1968, 12 p., Eo

44-a IFES en Ĉeĥio

En trajno reveninta de la 14-a IFEF-kongreso en Budapeŝto en 1962 babilis francaj kaj aŭstraj fervojistoj pri la eblecoj de vintra renkontiĝo. Tiel naskiĝis la ideo pri Internaciaj Fervojistaj Esperanto-Skisemajnoj (IFES), kies unua okazis jam en februaro 1963 en Landeck en Aŭstrio. La eĥo estis tiel bona, ke necesis ripetado en la sekvantaj vintroj.

Post sukcesa 37-a IFES en la jaro 1996 en Kouty nad Desnou (unuafoje sur teritorio de ĈR) la Ĉeĥa landa sekcio de IFEF en kunlaboro kun Landa Konsilio de FISAIC ĉe Ĝenerala Direkcio de Ĉeĥaj Fervojoj organizis por fervojistaj skiemuloj jam la 44-an IFES en Kunčice pod Ondřejníkem. Ĝi okazis de la 4-a ĝis la 11-a januaro 2003 kun 36 partoprenantoj el ses landoj (Danio, Francio, Germanio, Rumanio, Slovakio kaj gastiganto Ĉeĥio). Ĝojinda estis partopreno de la 13-membra grupo rumana kun plimultaj gejunuloj, kiuj aŭdis pri bona etoso de la skisemajnoj kaj volis ĝui ĝin ankaŭ.

Ĉar inter partoprenantoj estis ankaŭ neskiantoj, la organizantoj preparis varian programon por ambaŭ grupoj laŭ interesiĝo. Dum skiemuloj veturadis al proksima skicentro Pustevny (1095 m super marnivelo kun sidloka telfero kaj 11 skiliftoj), neskiantoj estis gvidataj de Ladislav Láni promeni tra bela ĉirkaŭa regiono aŭ viziti proksimajn valaĥiajn urbojn (Frenštát pod Radhoštěm, Rožnov pod Radhoštěm) kaj iliajn vidindaĵojn. Marde kaj jaŭde oni organizis tuttagajn ekskursojn per aŭtobuso por ĉiuj cele interkonatiĝi kun "Valaĥia Reĝlando". La

regiono ricevis sian nomon laŭ Valaĥoj, anoj de la ĉefgento, loĝanta en Valaĥio (nun parto de Rumanio), kiuj en la 17a jc. amase migris al Moravio kaj ilia nova teritorio do fariĝis Valaĥio. Oni vizitis la urbojn Kopřivnice kun Teknika Muzeo de la aŭtomobilfabriko Tatra kaj Honorhalo de la famaj ĉeĥaj sportistoj kaj olimpikaj venkintoj Dana kaj Emil Zátopek, Příbor kun historia centro kaj Memorhalo de Sigmund Freud, la aŭstra kuracisto kaj fondinto de psikoanalizo, Štramberk - la urban memorrezervejon kun gotika burgo el 13-a jarcento kaj groto Šipka, Nový Jičín kun renesanca kastelo Žerotínský, distrikta patrujsciencia muzeo kaj fama ekspozicio de ĉapeloj, historian urbon Fulnek (fondita en 1293) kun historia urboplaco de J. A. Komenský, urbodoma turo konstruita en 1610 kaj Monumento de Jan Amos Komenský, kaj aliajn lo-kojn. Ĉiuvespere okazis amuza programo konsistanta el Literatura anguleto, prelegoj, projekciado de video-filmoj, konkursoj, ne mankis la tradicia maskobalo kun dancado kaj premiado de la maskoj. Ĉiu partoprenanto ricevis por memoro art-nivele preparitan Partoprenliston pri la okazinta IFES, ĉiuj konkursoj inkluzive sportaj skikonkursoj en slalomo kaj skikurado estis premiitaj per belaj diplomoj, plaĉaj medaloj kaj objektaj memorpremioj disponigitaj tiucele de la Landa Konsilio FISAIC ĈD, kies sekretariino d-rino Anna Abelovská estis la ĉefa organiza animo de la sukcesa aranĝo.

La venonta 45-a IFES en la jaro 2004 okazos en Francio.

Jindřich Tomíšek

Solena kunveno en Vieno

Omaĝe al Semajno de Internacia Amikeco (SIA) la 11-an de februaro 2003 okazis la jam kutima komuna aranĝo de la Aŭstria Esperanto-Federacio (AEF) kaj la Aŭstria Fervojista Esperanto-Federacio (AFE) en la klubejo de AFEF en Vieno. La ĉefa programo de la vespero estis prelego de Martin Stuppnig kun lumbildoj "Ĉinio: ĉu ŝanco por nia E-movado?" La preleganto ne nur interese parolis kaj pere de lumbildoj montris interesaĵojn de la metropolo Pekino kun multnombraj palacoj, temploj, klostroj, pagodoj, monumentoj, gigantaj palacoj ktp., priparolis kaj montris "Malpermesitan Urbon", Grandan Muron kaj pli nordan urbon Chengde kun la someraj palacoj - la rezidejon de la regintaj dinastioj, sed li interese parolis ankaŭ pri renkontiĝoj kun ĉinaj esperantistoj kiel gasto de la Ĉina Esperanto-Ligo, Ĉina landa asocio de IFEF kaj fine en la Ĉina Radio Internacia. Dum solenaj alparoloj la ĉeĥa gasto salutis en la nomo de la Fervojista sekcio de ĈEA kaj informis pri la 44-a IFES.

Dek du steloj sur la flago de EU restos

Ĉu plinombriĝos steloj sur flago de Eŭropa Unio, kiam aliĝos al ĝi pluaj ŝtatoj? La respondo estas ne, la dekdu steloj ja neniam simbolis dekdu ŝtatojn de EU. La flago de EU estis akceptita en la jaro 1986 kaj la steloj havas sian originon en katolika religio, kiu en ŝtatoj de la Unio hegemonias. La flagon iniciatis

Arsen Heitz, konvinkita katoliko kaj antaŭ sia morto li konfesis, ke inspiris lin bildo de Virgulino Maria Mirakla en la strato du Bac en Parizo. Interalie, ankaŭ la statuo de Virgulino Maria en la katedralo de Strasburgo estas kronita de la dekdu steloj. Interligitecoj povas esti ankaŭ aliaj - la dekdu apostoloj de Jesuo, dekdu monatoj de la jaro aŭ la sama nombro de la signoj en zodiako kaj el historio ni konas la dekdu laborojn de Heraklo.

La ovo de Kolumbo

Per tiuj ĉi vortoj oni aforismas pri eltrovaĵo, kiu ŝajnas simpla post ĝia eltroviĝo. La skriba mencio pri la ovo de Kolumbo aperas en la verko de Voltero "Traktato pri ĝenerala historio kaj moroj kaj pri intelekto de la nacioj" el la jaro 1759. Ĝi rakontas preskaŭ anekdotan okazaĵon, okazintan laŭdire en Hispanujo post reveno de Kristoforo Kolumbo el lia navigvojaĝo. Li estis nomumita admiralo kaj dum la festeno omaĝe al li unu jaluza membro de la reĝa familio proklamis, ke la navigvojo de Kolumbo envere ne estis tiom malfacila. Kristoforo Kolumbo prenis malmole kuiritan ovon kaj petis tiun sinjoron, ke li starigu ĝin sur ĝia pinto. Sed nek li, nek aliaj partoprenantoj en la festeno sukcesis fari tion. Kristoforo Kolumbo poste batfrapigis pinton de la ovo kaj sen problemo starigis ĝin kun rimarko, ke se oni scias, kiameniere fari, la tasko fariĝas vere facila. Kaj ekde tiam diraĵo "la ovo de Kolumbo" estas uzata ĝis nuntempo.

J. Tomišek

Infanoj el Okříšky

En Okříšky proksime de Třebíč, ĉe la elementa lernejo, funkcias rondeto de junaj esperantistoj, gvidata de PhDr. Kamila Bártlová. Pri la agado de la rondeto aperas informoj regule en la loka informilo *Zpravodaj z Okříšek* (Informilo de Okříšky). La unua numero 2003 alportis informon pri lernanto Marek Dočkal, kiu sukcese partoprenis konkurson de la pedagogia gazeto I.C.E.M eldonata en Francio. Dank' al liaj bone solvitaj taskoj aperis Ĉeĥio inter premiitaj landoj kune kun Finnlando, Francio, Norda Afriko kaj Rumanio. La artikolo rememorigis la antaŭajn sukcesojn de la rondeto en 1998, kiam en desegnokonkurso gajnis premiojn Pavla Vrtalová (infan-ĝardeno) pro desegno *Feliĉa familio* kaj Monika Pacholřková (9-a klaso) pro pentraĵo *Amikoj en la tuta mondo*. La rondeton subtenas la lernejestro PaedDr. Jaromír Velc.

Zamenhof bone kuras

Ĉevalo nomita Zamenhof gajnis la 15-an de majo la ĉefan kurkonkurson en Longchamp (Prix du Bois de Boulogne / Premio de la Bulonja arbareto) apud Parizo. La ĵokeo estis S. Pasquier.

(RET-INFO laŭ Marc Anselmi, sekretario de Arras Esperanto)



Esperantistoj de EK Poruba, EK Vítkovice kaj EK Opava renkontiĝis la 6-an de majo 2003 en Poruba ĉe la "Arbo de Esperanto" plantita ĝuste antaŭ unu jaro.

Monda Esperantista

Sporta Ligo estas lanĉota

Iniciatite de bulgara esperantistino s-ino Klarita Velikova, kiu loĝas en Koreio, Monda Esperantista Sporta Ligo estas lanĉota. Tiuj, kiuj havas intereson pri sporta fako, turnu vin al: www.esperanto.co.kr en kiu troviĝas la ĉambro por sporto-amantoj aŭ sportistoj en Esperantujo. Retadreso de Klarita estas: rita@eses.net.

Kompendio pri psikoanalizo de Sigmund Freud kaj Kompleksia medicino kaj saama akupunkturo de Puramo Chong estas novaj eldonaĵoj de KAVA-PECH.

Rememore al Jaroslav Novobilský, lernejestro kaj esperantisto



En tiu ĉi jaro ni rememoras la neĝisvivant 100-an naskiĝdatrevenon de Jaroslav Novobilský (14.10.1903 - 7.5.1942), respektata pedagogo de natursciencaj fakoj, meritplena kulturorganiza aganto kaj fervora esperantisto, kies vivon en la aĝo de neplenaj 39 jaroj perforte finis pafoj de faŝistaj murdistoj en la nazia koncentrejo Mauthausen (Aŭstrio).

J. Novobilský naskiĝis en la moravia vilaĝo Závšice, distrikto Nový Jičín. La medio de la laborista familio kun ses infanoj estis simpla kaj surrante de malriĉeco. Tamen la gepatroj ebligis al sia filo studi gimnazion kaj la porinstruistan instituton en urbo Příbor. En 1923 li fariĝis instruisto en kelkaj vilaĝaj lernejoj kaj en sekvaj jaroj plenumis ekzamenojn por instrui matematikon, fizikon kaj kemion. Kun diplomo li eklaboris (1927) en la ĵus fondita duagrada lernejo en la ĉelima

Melč apud Opava. Tie ekzistis la ĉeĥa minoritato sub forta ekonomia kaj kultura premoj far la germana majoritato. La ĉeĥaj instruistoj luktis por la egalrajtigo de ambaŭ kunekzistantaj nacioj.

En 1931, apenaŭ 28-jara, J. Novobilský estis nomumita direktoro de la duagrada kaj unuagrada lernejoj kaj de la antaŭlerneja infanedukejo. Li stariĝis antaŭ sin taskon konstruigi en Melč imponan novan lernejkonstruaĵon por la ĉeĥa junularo. Elspezinte enorman energion li akiris konstru-permeson kaj en 8 monatoj estis la nova lernejo finkonstruita. La solenan malfermon salutis perletere prezidento T. G. Masaryk kaj silezia poeto Petr Bezruč.

En la nova lernejo oni praktikis la plej modernajn instrumentojn kaj instruilojn. J. Novobilský fondigis diversajn studentajn klubojn, nome literaturan (propra revueto Rozmach), natursciencan, geografian, kantan, sportan, radioamatoran kaj Esperantan. La du lastajn gvidis li mem.

Krome oni nedevige instruis en la lernejo piano- kaj violonludon kaj stenografion. Tiutempe pionira estis fondo de "lerneja monŝparejo", kiu servis al la lernantoj en tempo, kiam en la vasta ĉirkaŭaĵo ne ekzistis iu alia mon-institucio.

La periodo de la rezultoporta laboro, de feliĉa familia medio kun la amata edzino Helena kaj du infanoj Jaroslava kaj Vlastimil, de amo kaj estimo far la civitanoj, prezentis la plej feliĉajn ja-

rojn de lia vivo. Sed ili daŭris nelonge: la perfida Munkena kontrakto en 1938 neniigis ĉion, kio estis farita kun elspezo de tiom da energio! Antaŭ la proksimiĝanta nazia armeo, kiu anektis la ĉelimajn teritoriojn de Ĉeĥoslovakio, devis J. Novobilský kun sia familio fuĝi el Melč. Post dramecaj okazintaĵoj, kelkfoja transloĝiĝado, perdo de privata havaĵo, li komence de 1939 eklaboris kiel direktoro de duagrada lernejo en Pňovice apud Olomouc.

En la nova, nekonata medio li rekomencis sian pedagogian laboron ne preterlasante eksterlernejan laboron, per kiu li celis kuraĝigi siajn samcivitanojn kaj konvinki ilin pri la nur provizora ekzisto de la faŝisma misregado en la ĉeĥaj landoj. Kiel arda patrioto li aniĝis al la kontraŭfaŝisma ilegala movado, en kiu li funkciis kiel regiona gvidanto.

Post perfido de la ilegala organizo Nová cesta-39 li estis la 23-an de oktobro 1941 arestita far la sekreta nazia polico "gestapo" en Olomouc, poste en Brno kaj fine en la nazia koncentrejo Mauthausen, kie la 7-an de majo 1942 la pafoj de ekzekuttrupo murdis lin kune kun aliaj membroj de la rezist-organizaĵo.

Ĉijare pasis 61 jaroj depost lia morto, sed li daŭre vivas en la memoro de siaj lernantoj kaj samcivitanoj. Memortabuloj, gazetartikoloj kaj studaĵoj konkorde alte aprezas lian plurterenan senlacaĵon laboron por sia

patrujo.

J. Novobilský fervore praktikis ankaŭ Esperanton. Verŝajne li konaĝis kun ĝi en la Porinstruista instituto en Přebor, kie studis kelkaj elstaraj ĉeĥaj esperantistoj, ekz. T. Čejka kaj J. Krumpholz. Li fariĝis membro de Universala Esperanto-Asocio kaj ĝia delegito por Závšice, pli poste por Melč. Lia lernanto de Esperanto kaj pli poste instruisto Jan Hadámek el Jakartovice rememoras: "Aŭtune 1927 J. Novobilský fondis el la plej bonaj lernantoj de nia klaso Esperantogrupon, en kiu li tre diligente kaj kun granda fervoro instruis al ni Esperanton. Ni estis 16 gelernantoj. Jam post Kristnasko, en la jaro 1928 ni sendis unuajn poŝtkartojn kaj leterojn al eksterlando."

J. Novobilský mem ligis kontaktojn kun eksterlandaj instruistoj por interŝanĝo de pedagogiaj spertoj. Esperanton li uzis ankaŭ dum siaj eksterlandaj vojaĝoj al Aŭstrio, Germanio, Italio, Jugoslavio kaj Sovetunio.

Post la anekso de Ĉeĥoslovakio en 1939 li uzis en siaj Esperantaj leteroj sendataj eksterlanden simplan kodon por informi siajn amikojn pri la vera situacio en la okupaciita respubliko. La gestapo kaptis tiujn ĉi leterojn, enketis la forsendinton kaj devigis lin surloke perletere rifuzi pliajn kontaktojn. Lia Esperanta aktiveco gvidis al lia persona tragedio.

-vn-

16-a seminario AEH en Skokovy

Antaŭ nelonge finiĝis Esperanto-seminario en Skokovy, kiun partoprenis pli ol 50 gesamideanoj. Denove partoprenis kelkaj eksterlandanoj, du polaj gesamideanoj, franco - fama Claude Martens - kaj svedino el Brno Vlad'ka Pelkonenová. Multaj revenas ĉi tien preskaŭ regule. Nur kelkaj unuopuloj estis ĉi tie unuafoje. Tio signifas, ke en Skokovy regas io, kio allogas partoprenintojn. Kaj tio estas plejparte belega regiono kaj vere amika etoso, kompreneble ankaŭ instruado kaj alia programo. Do nunjare kiel kutime antaŭtagmeze okazis instruado. Kvar kursojn gvidis spertaj instruistoj Zdeňka Novotná, Jindra Drahotová, Jaroslav Mráz kaj Ing. Jan Werner. Posttagmeze okazis piedekskursoj en proksiman ĉirkaŭaĵon, kie estas belegaj rokoj, arbaroj kaj diversaj belegaj floroj. Kelkaj interesatoj uzis partoprenon de s-ino Eva Pánková, kiu preparis diversajn manlaboraĵojn, kiujn la ĉeestantoj povis mem produkti. Aliaj dediĉis sin al jogo. Estis organizita tuttaga ekskurso al muzeo de Škoda-produktejo en Mladá Boleslav (aperis ankaŭ esperantlingva flugfolio pri la aŭtomobil-fabriko) kaj al kastelo Detenice kaj tiama bierfabriko. Pri sanstato ofereme zorgis D-ro Hradil. Vespere okazis diversaj interesaj

prelegoj, pri historio de regiono (s-ino Erbalová), pri juvelŝtonoj (Ing. Turková), pri elektrejo Temelín (Ing. Werner) kaj s-o Mráz ankaŭ prezentis unu historian personecon. Geedzoj Dvořák prelegis kaj montris



videofilmon pri UK en Fortaleza, geedzoj Stibůrek pri pasinta seminario kaj kongreso de AEH. Kompreneble ke restis ankaŭ tempo por vespera komuna kantado. Neforgesebla estis adiaŭa vespero. Ĉiuj kursoj kontribuis al la programo. La programo estis vere tre amuza kaj varia, oni eĉ ne kredus tion, kiom da arttalentoj estis en nia rondo. Kaj dimanĉa adiaŭo - ĉiu adiaŭis kun ĉiu kun promeso, ke revenos aŭtune. Fine estas necese diri kaj substreki, ke en Skokovy krom la loka koboldo "SKOKO" regas bona humoro, familia etoso, simple, ĉiu estas ĉi tie hejme. Koran dankon al organizantoj.

Věra Podhradská

PLUAJ KURSOJ

29.6.-9.8. LANČOV

19.-26.7. SEBRANICE

28.-30.11. PAROLIGA KURSO

Hašek kaj Esperanto

La eldonejo Atlantis en Brno ĵus eldonis biografian romanon de Pavel Gan *Osudy Jaroslava Haška v říši carů a komisařů* (Aventuroj de Jaroslav Hašek en la imperio de caroj kaj komisaroj). Sur la paĝo 54 Hašek rakontas, kiel Esperanto savis la vivon al ĉina kuiristo Vang, kiu falis en la manojn de mongolaj malamikoj. Kiam tiuj volis lin mortigi, Vang komencis sakri kaj blasfemi en Esperanto. La mongola princo konsterniĝis de ĝojo, ĉar ankaŭ li estis esperantisto, korespondanta kun samideanoj en Tokio kaj Parizo. Li savis Vangon kaj faris el li sian personan kuiriston.

Reveno al Międzygórze

Silezia Esperanto-Asocio invitas al la XXXVII Internacia Esperanto-Feriado (23.6.-6.7.2003). Ni kune loĝos en ripozdomo kun 2- ĝis 3-personaj ĉambroj ekipitaj per propra banĉambro kaj televidilo. La domo havas surlokan manĝejon, du terasojn, lokon por rostado, sportejon kaj saŭnon. Kursoj por komencantoj kaj progresantoj, prelegoj, ekskursoj ktp. Prezo 250 EUR aŭ parte po 20 EUR tage. Silezia Esperanto-Asocio, str. Dubois 3/1, 50-208 Wrocław, Pollando, tel/fakso: (+48 -71) 329 69 54, reta, adreso: wroclavo@poczta.onet.pl

Esperanto kaj internaciaj organizaĵoj

estas titolo de la 38-a kajero de la serio E-dokumento. Prof. Lee Chong-Yeong kolektis en ĝi rezoluciojn, decidojn kaj rekomendojn favorajn al Esperanto.

Konciza Etimologia Vortaro

estas nova 504-paĝa verko de Andre Cherpillod.

Henriko la Kvina

de William Shakespeare en traduko de Humphrey Tonkin aperis meze de aprilo.

Omraam Mikhael Aivanhov

estas franca bulgardevena filozofo (1900-1986), kies verkojn esperantigis Claude Piron kaj eldonis svisa eldonejo Prosveta (Nancy Fontannaz, Ruisselet 9, CH-1009 PULLY). Bibliotekoj povas ricevi la librojn senpage (*La jogo de nutrado*, *Sub la signo de la Kolombo paco regu*, *Espero por la mondo: spirita galvanoplastiko*, *Oraj reguloj por la vivo ĉiutaga*).


Ligo HUMANITAS

fondita en 2002 surbaze de ideoj de Komenio kaj Zamenhof (Oštarijska 8, 10000 Zagreb, Kroatio), eldonis prospekton pri siaj hom-ekologiaj principoj. En Ĉeĥio informas Jaroslav Karhan, Erenburga 7, 779 00 Olomouc.

e) En trioloj estas la akcento sur la unua noto.



f) Sinkopo estiĝas, kiam post mallonga akcenta taktero sekvas longa taktero, kiu kvazaŭ inkludas en si krom la sekvanta senakcenta taktero ankaŭ la postsekvantan akcentan takteron. Tiu ĉi longa, kvazaŭ duopa taktero ricevas flankan akcenton, sinsekvas do du akcentaj notoj, el kiuj la unua estas akcentita pli peze. Tiaj sinkopaj ritmoj estas tipaj por la moraviaj kaj slovakaj kantoj. Inter alie tio estas konsekvenco de la ĉeĥa kaj slovakaj lingvoj, en kiuj post la akcentita unua mallonga silabo sekvas silabo kun longa vokalo, sekve do ankaŭ longa taktero: *vykrúcaj, nezrúcaj, cigána* ktp. Jen sinkopoj:



Nun ni sekvu tradukojn de la slovakaj popolkanto "Tancuj, tancuj" (de la unua strofo), kies versiojn A kaj C mencias en sia teksto ankaŭ Jiří Kořínek. La kanton karakterizas dukvarona takto. Antaŭtempe ĝi estis esperantigita nekorekte, vidu la version A



- A. Dancu, dancu, dancigu,
fornon nur ne faligu,
gardostaras kadeto
en flikita jaketo.

Ĉiuj vortoj finantaj unuopajn versojn estas trisilabaj laŭ la ĉeĥa originalo (dancigu, faligu, kadeto, jaketo) kaj diference de ĝi havas akcenton sur la antaŭlasta silabo, kvankam la muzika peza akcento eŝtas sur la unua silabo de la nomitaj trisilabaj vortoj. La traduko estas fuŝita!

- B. Dancu, dancu, movu vin,
preter forno ŝovu vin,
ĉe malvarmo multe pli
ol kusenoj servas ĝi.


La dua traduko devenas el la 1950-aj jaroj. Ĝia aŭtoro estas Tomáš Pumpr. Ĝi estas multe pli bona, ĉar en la lasta takto de ĉiuj versoj estas plenumita la koincido de lingva kaj muzika akcentoj. Tamen, ne okazas lingva akcento de sinkopaj takteroj, kio malaltigas kvaliton de la traduko.

C. Dancu, dancu, ne staru,
sed ke forno ne falu,
vintre forno tre gravas,
liton ĉiu ne havas.

En la C-traduko J. Kořínek atribuis la ĉefan akcenton de mallonga taktero al akcente hibridaj unusilabaj vortoj (ne, tre), kiuj akcenton povas ricevi, se necese. La flankan sinkopan akcenton de longa taktero prezentas en la teksto vere akcentaj lingvaj silaboj: staru, falu, gravas, havas. Tiu ĉi traduko estas senmanka. Ĝi estis publikigita en *Starto*, 1974, n-ro 8 (46), p. 13.

En la A-traduko estas la trisilabaj vortoj fine de la versoj nepre neakcepteblaj. Kiel estas menciite apud la C-traduko, la fortan akcenton de la peza unua kurta taktero tie povas ricevi unusilabaj vortoj (ekz. la adverbo “ne” aŭ prepozicioj), necesakaze ankaŭ flankelemento de kunmetita vorto kiel ekz. *mortlaca*, *belsona*, aŭ prefiksita vorto, ekz. *malbela*, *disĵeti* (ekzemploj laŭ J. Kořínek).

Problemon de longaj akcentaj takteroj sperta tradukanto devas observi kaj trovi akcepteblan solvon, por ke li ne risku miskomprenon, kiel J. Kořínek montris helpe de ĉeĥlingva ekzemplo:



La mallongan silabon “*kru*” en la loko de longa taktero oni fakte ne kantus “*ty jsi krutá*” [vi estas kruela], sed “*ty jsi krŭta*” [vi estas meleagrino]. Io simila estas okazigebla ankaŭ en Esperanto. Konsciu ekzemple la vortduopojn: *banan* kaj *banan’* (banano), *koran* kaj *koran’* (korano), *venus* kaj *Venus’* (Venuso) k.a.

La akcentajn silabojn oni ofte akiras per elizio de la substantiva finaĵo -o (neniam -on, -a, -e, -i). Tio estas permesita ne nur en poezio, sed ankaŭ en muzikaj tekstoj. Ekz.: kor’, somer’, panoram’. Sed ne ĉiuj eliziitaj silaboj taŭgas por kantado pro malfacila prononco. Ekz. tabl’, septembr’.

La rezultan tradukitan tekston oni nepre devas elprovi per efektiva “trakantado”, ĉu ĝi estas facile kantebla kaj sufiĉe belsona kaj ne “orelŝira”. La malkorektajn tekstojn estas necese forigi aŭ reverki.

La aŭtoro dankas al Josef Cink por la afabla tralego kaj revizio de la teksto.

TERMINARO DE FELOJ

(seplingva: Esp-o, latino, angla, germana, rusa, ĉeĥa, slovaka). 96 p. - KAVAPECH, Dobřichovice, 1998, 126 Kč.

Diplomita geografo *Lubomír Sředa* prilaboris la terminaron en 8 ĉapitroj: ĝeneralaj nocioj, partoj de feloj, feloj laŭ deveno, feloj laŭ kvalito, feloj laŭ maniero de konservado, feloj laŭ maso, senharaj haŭtoj, felspecoj. Sekvas la sep alfabet-registroj.

Temas pri eksterordinare kompetenta terminologia pliriĉigo de Esperanto, kies koncernfaka reputacio tiel fariĝas senduba. Aliaflanke, la etnolingvaj ekvivalentoj, kolektitaj kun same kompetenta akurateco, ebligas vastan uzadon internacian ekster la medio esperantista.

Kiel unua provo tiufaka, ĝi ja ne povas esti tute senriproĉa. Ekz. eblas modifi ĝian ordigon de la 215 kapvortoj, kompletigi la komunuzan best-nomaron esperantlingvan fojfoje per pli scienca. Tamen, tiun ĉi mankon kompensas la zorge registrata nomenklaturato latina. Laŭ vidpunkto terminologia estas malfacile trovi erarojn, krom kelko da bagatelaj misoj. Estus dezirinde, se ankaŭ alifakaj terminaroj en Esperanto povus fieri pro simila

precizeco, kia estas tipa por TF.

Kvankam inter la sep lingvoj mankas la franca, tamen jam aperis brila recenzo fare de *Jean Marin* en FRANCA ESPERANTISTO, 1999, n-ro 504, p.13, el kiu mi citas: "... tiu mirinda libreto estas fonto de scio. Bonan legadon!"

Mi povas konfirmi, ke ankaŭ mi profunde instruiĝis el la eminenta verko kaj daŭre utiligadas la sciojn, kiuj ja taŭge koheras kun mia orientiteco naturhistoria.

Aparta dankego adresiĝu al la eldonejo. Tre mi deziras, ke tiu ĉi profitu el rapida disvendo de TF tra la mondo!

J. Kavka



Esperanto pro ĉeti

Nova lernolibro de Jana Melichárková kun ilustraĵoj de Mirka Tomečková ĵus aperis, prezo 98 Kč.

Fakaj studoj en Esperanto

Kolekto de prelegoj el KAEST '02 en Dobřichovice estas freŝe eldonita faka verko (ĉefa temo: elektronikaj rimedoj), prezo 150 Kč.

La tri libroj estas haveblaj ĉe Libroservo de ĈEA.

Petr Tomašovský (elektis)

PERLOJ de lernejoj kajeroj

- * Opero estas, kiam mortigito kantas.
- * Teorio estas, kiam oni ĉion scias, sed nenio funkcias.
- * Praktiko estas, kiam ĉio funkcias, sed neniu scias kial.
- * Malpuran ludon ili ludis kun li tial, ĉar li rifuzis malpurigi per ili siajn manojn.
- * Ili tiris je unu ŝnuro, sed ĉiu aliflanken.
- * Mia fratino estas ankoraŭ tro malgranda por distingi nian hundon de la ceteraj familianoj.
- * Kiam mi laŭdas mian malgrandan fraton pro bona laboro, li ridetas, ĉar li ankoraŭ ne havas prudenton kaj volas nenion pro tio.
- * Kiam estas kinaĵo malnova, ĝi ankoraŭ prezentigis en televido.
- * Ŝoforoj estas teruro de ŝoseoj, ĉar ŝoseoj estas teruro de ŝoforoj.
- * Kio tiel fiodoras ĉi tie? Ĉu eble tiuj floroj tiel bonodoras?
- * Li suprenkuris la ŝtuparon tiel rapide, ke nur post momento estis aŭdebla lia piedbatado.
- * Ni feris ĉe digolago, kie la gepatroj post dek kvar tagoj konstatis, ke ili ankoraŭ ne konas min.
- * Koĉero estis homo, kiu kun ĉevalveturilo atendis pasaĝerojn en flughaveno
- * Vagabondo iradis de domo al domo lernante esti riĉa.
- * Matene komencis plui kaj posttagmeze ĉesis. Ekpluvegis.
- * Pugnoj estas ĉe kelkaj bestoj hufoj.

- * Ĉirkaŭbaritaj arbaroj estas fondataj por edukado de arbara bestaro.
- * Dum somero ni devas ĝardenon priverŝi ĉiutage, aliokaze anstataŭ herbo kreskus fojno.
- * Mi konas jenajn akvorezervujojn: maro, fiŝlago kaj bankuvo.
- * Korpo de fiŝo konsistas el kapo, kiu malrapide ŝanĝiĝas en voston.
- * La leono kriegis kiel tigro.
- * Multajn tagojn pluvis, ĉar oni tion prognozias.
- * La malnovan muelejon aĉetis urbaj homoj, sed ĝis nun ili muelas tie senĉese nur morteron kaj betonon.
- * Barometro estas aparato por veterkreado.
- * Tre frumatene ni iris kolekti fungojn, sed ni trovis nur dormemajn fungokolektantojn.
- * Plej bone estas ne timi kaj ekpaŝi rekte en la vivon.
- * Urson ni povas forpeli sole per energia kriado.
- * Ĉe fiŝlago montris batalpretecon plej multe la kuloj.
- * Elfosajoj estas instruaj, ĉar ili estis elfositaj.
- * Cikonio estas konata birdo, sed neniu plu kredas pri ĝi.
- * Peruko estas novaj haroj sen kapo.
- * Mi volas fariĝi bestkuracisto. Ekde frua junaĝo mi estis edukata inter brutaro.
- * Sklavoj rajtas nenion, eĉ ne iri kinejon.
- * Ferrubon ni kolektas por fari el ĝi novan.
- * Reĝoj ne ĝisvivis altan aĝon pro nesufiĉa movo, kiun malebligis al ili la trono.

Lingvaj ludoj kaj enigmoj (13)

Solvo de la ŝanĝenigmoj el la antaŭa numero:

23. saluto - salato

24. karoserio - kara serio

Pluajn vortludajn enigmojn oni povas nomi

ALMETO kaj DEMETO

Al la komenco de esprimo ni **almetas** (aldonas) aŭ de ĝi **demetas** (forprenas) unu literon, per kio tute ŝanĝiĝas ĝia signifo. La nomo de la enigmo dependas de tio, ĉu ni en la propono kiel **la unuan** prezentos malpli longan esprimon (ĉe almeto) aŭ la pli longan (ĉe demeto).

Jen kelkaj substancoj de la enigmoj: ondo - rondo, sveni - veni, timulo - stimulo, preferi - referi.

La prezento de la enigmo povas esti la sama, kiel en la antaŭaj okazoj: ĉe la difinoj aŭ en tekstoj estas la solvotaj esprimoj grafike presignitaj aŭ anstataŭitaj per (preskaŭ)sinonimoj.

Montraĵoj:

Almetoj:

---- hom', al kiu kresko mankas

b ---- arbo, kies ŝelo blankas

Solvo: etulo - betulo

Se la ĉe

sidas survizaĝe,

ĝin mortigi per bastono

estas ne tre saĝe.

Solvo: kulo - okulo.

Pri eldonitaj poŝtmarkoj

vigla diskuto ekestis,

multaj **kritikoj de ili**

vere pri tio atestis.

Solvo: rimarkoj pri markoj

Demetoj:

----- geografia direkto

---- sistemo ĝis perfekte

Solvo: nordo - ordo

Nenio elkreskis el la - - - - - semita,

do sekvis - - - - - pro la vana pen' senprofita.

Solvo: aĉa greno - ĉagreno

(triobla)

En teatro jen sonas **manklako**,

kiu similas al maronda **bruo**.

Por geaktorj jen estas ĝi **gloro**

pro la arioj belsonaj al **senso**.

Solvo: aplaŭdo - plaŭdo - laŭdo - aŭdo.

Nun ion por vi al solvo:

25. DEMETO

Ĉu povas la blindulon - - - - -

hom', kiu ne kapablas - - - - - ?

26. ALMETO

Ĉu nur poentoj **al registro**

ludantoj en marĉoj pelas

aŭ al la ĝoj' el **luda ĉarmo**

iliaj penoj ankaŭ celas?

Josef Cink

Ni kondolencas



- La 15-an de decembro 2002 forlasis nin por ĉiam **Jaroslav David** el Pustějov en aĝo de 83 jaroj. Li estis sindonema kunla-

boranto de Terminara sekcio de FS ĈEA kaj Terminara kaj Fake-aplika komisionoj de IFEF, tradukanto kaj verkanto de fakaj, precipe fervojtemaj artikoloj kaj Honora Membro de IFEF. Inter alie li tradukis Trakcian vortaron ĈKD Praha el 1965 (en kunlaboro kun inĝ. J. Werner kaj inĝ. J. Vojáček), dum pli ol tridek jaroj li aktivis en kompilado kaj prilaborado de fervojfakaj terminaroj kaj en tradukado de Lg II, Lg III kaj Lg IV, kontribuis al Fervojfakaj Kajeroj, Terminara Kuriero (TeKu) k.a. Lastatempe li sendadis lingvajn taskojn kaj ŝercojn ankaŭ al Starto.

Ni kondolencas al lia edzino Jiřina kaj samtempe tutkore dankas pro multaj materialoj, donacitaj de ŝi al Esperanto-Fako de la Urba Muzeo en Česká Třebová.

FS ĈEA

- La 25-an de februaro forpasis **Karel Červenka** el Zdice.

- La 28-an de aprilo subite forpasis nia nekredeble vigla samideanino **Marta Křenková** (n. 1930). Ankoraŭ 3 tagojn

antaŭ la morto ŝi partoprenis inaŭguron de fremd-lingvaj tradukoj el Karel Čapek en Strž, pri kio ŝi verkis kontribuon kun Čestmír Vidman (p. 38).

- La 14-an de februaro mortis en Nové Zámky fama hungarslovakia samideano **Ernö Geleta** (n. 1927).

Aldo de' GIORGI (1924-2003)

estis itala verkisto en Esperanto, Akademiano (1986-1998), komisiito de UEA pri kulturo (1977-1980), juĝanto pri poezio en la Belartaj Konkursoj de UEA (1981- 1998), organizanto de multaj literaturaj konkursoj, ano de la juĝkomisiono de Fondaĵo Grabowski ekde 1990, kaj kunlaboranto de multaj revuoj. Dum dudek jaroj (ĝis 1996) li estis literatura redaktoro de "Heroldo de Esperanto". Li redaktis la italan revuon "L'esperanto" (1979-1988). De 1974 li verkis originale poemojn, rakontojn kaj eseojn, ofte konkurse premiitajn, ekz. antaŭparolon de *Ombro sur interna pejzaĝo* de Spomenka ŠTIMEC kaj redaktis la plenan poemaron de William AULD, *En barko senpilota* (1987). Lia propra ĉefverko estas poemaro *Pretertempe* (1982).

KALENDARO 2003

- 7.6. 70 let Svitavy
 23.5.-23.6. Ekspozicio de esp. gazetoj (Kinejo Metro en Prostějov)
 19.-22.6. La 2-a renkontiĝo en Plasy
 19.-23.6. IKUE-renkontiĝo en Koclířov
 29.6.-9.8. SET Lančov
 12.-18.7. EKOTUR Bohemia Karsto (Karlštejn)
 19.-25.7. OSIEK-konferenco
 19.-26.7. IKUE-tendaro Sebranice
 26.7.-5.8. Flugkaravano al UK Gotenburgo (Svedio) kaj Kopenhago (Danio)
 30.8.-6.9. Ekumena Kongreso Rimini (buse)
 20.9. Esperanto-tago Pardubice
 26.-28.9. 16-a IKF Ústí nad Labem
 17.-19.10. Konferenco de ĈEA en Litomyšl
 22.-29.10. Lingva seminario Skokovy
 25.10.-12.11. Ekoturisma flugkaravano al Koreio, Japanio kaj Taivano
 24.-28.11. Internacia kurso de Esperanto en Dobřichovice
 28.-30.11. Paroliga kurso en Dobřichovice
 6.12. La 23-a Ĉeĥa-Saksa Tago Ústí n.L.

Jak platit svazu

V kterékoliv pobočce Komerční banky vyplníte pokladní složenku pečlivě ve všech kolonkách, tedy: *měna účtu*: Kč, č. účtu: 3330-021/0100, *měna hotovosti*: Kč, částka: slovy, kolik platíte, *jméno a příjmení*, adresa, RČ (nemusí být). Pokud platíte za kroužek (klub, sekci), vyplňte stručně (EK Velim) do kolonky *Vklad jménem* a pošlete tajemníkovi jmenný seznam. Pokud posíláte peníze za sebe, **zopakujte v této kolonce své jméno**. Velmi důležitý je pro určení platby variabilní symbol - číslo (5-místné), které je buď stálé (viz seznam) nebo bude vždy uvedeno na pozvánkách nebo v inf. článku ve Startu. Konstantní symbol je vždy 0379.

Seznam čísel:

- 06940 členství ČES
 06941 členství UEA
 06942 předplatné Starta bez členství
 06943 dary ČES
 50200 sekce železničářů
 50400 komise pedagogická
 50401 písemný kurs začátečníci
 50402 písemný kurs pokročilí
 50403 členství ILEI
 50404 Paroliga kurso
 50405 svazové zkoušky
 50500 sekce přátel SAT
 50600 sekce šachistů EŠLI
 50800 sekce nevidomých LIBE
 50900 sekce zdravotníků UMEA
 51000 sekce křesť. esp. KELI
 51100 sekce katol. esp. IKUE
 70100 komise pro tisk a inf.
 80200 ediční fond
 80300 propagace v tisku
 80400 fond Tilio

Pro jistotu napište tajemníkovi svazu, kdy a kolik jste platili - máme řadu neurčených plateb, a to na různé akce, členství ČES, ale i na členství UEA.



Jak poslat peníze do zahraničí?

Pokud chcete zaplatit knihu, předplatné časopisu, účastnický poplatek apod. do zahraničí, pošlete peníze **mezinárodní složenkou MPI**, kterou si vyžádáte na poště.

Periodikum Českéého esperantského svazu (34. ročník)

**Redaktor: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,
malovec.starto@clavis.cz;
www.clavis.cz/starto**

**Členská evidence a změny adres:
Pavel Polnický, ČES**

Uzávěrka dalšího čísla: 31.7.2003

**Presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio
(34-a jarkolekto)**

**Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ
rekte ĉe nia Asocio**

**Abonprezo: 9 eŭroj
(se aerpoŝte: + 2 eŭroj)**

**Redaktoro: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

**Ĉeĥio, e-mail:
malovec.starto@clavis.cz;
www.clavis.cz/starto**

Presis: OPATISK Opava

**Redaktadfermo de la sekva numero :
31.7.2003**

ISSN 1212-009X

EK TEPLICE

Informan prelegon kaj diskuton pri Esperanto por gestudentoj de tri klasoj de gimnazio en Teplice efektivigis la 21-an de majo 2003 Esperanto-klubo Teplice. Parolantoj estis Vlastimil Novobilský, vicprezidanto de EK Ústí nad Labem, Věra Novobilská kaj prezidanto de EK Teplice Zdeněk Rusín. En aŭlo de la gimnazio estis aranĝita ekspozicio de libroj en Esperanto, pruntitaj de Regiona

Biblioteko en Teplice kaj libroj de la parolantoj. Studentoj vigle diskutis kaj gitar-akompane en Esperanto kunkantis el preparitaj tekstoj. Ili ankaŭ estis atentigitaj pri www-paĝoj en Esperanto de gimnazio de Bertolt Brecht en Drezdeno. Kelkaj de la studentoj mendis lernolibron de Esperanto "Esperantem za tři měsíce". Ĉeestis redaktorino de radiostacio Sever de Ústí nad Labem Petra Rousová kaj sekvontan tagon en tiu ĉi stacio aŭdiĝis ŝia intervjuo kun la parolantoj. La informado en la sama gimnazio ripetigis en oktobro 2003. La okazaĵo nepre helpis forigi malaltan nivelon de konoj pri internacia lingvo inter la gimnazianoj.

MALOVEC MIROSLAV
BOSONOŽSKÁ 15
625 00 BRNO